

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 313 (80) KVINA EPOKO

DECEMBRO 2000

SOMERAJ
ARANĜOJ 2

KOLEKTIVA
VOJAĜO 2

NIA AGADO 3

INTERNACIE 6

INFORMADO 8



ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrata ĉe Generalitat de Catalunya en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de UEA, FEL, *Literatura Foiro*, IKEL, *La Kancerkliniko*, *La Dua Jarcento (IEM)*, *La Ondo de Esperanto* (peras aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

Ret - adreso: kea@stel.net

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 2000: Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Neus Moly; Vicprezidanto: Josep Franquesa; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; kasisto: Llibert Puig; Komitatanoj: Lluís Aragay, Mercè Porta, Luz Vázquez, Sun Farràs, Roger Prieto.

Kontrola Komisiono: Miquel A. Altuna, Arnald Massanas, Lluís Armadans

Kataluna Esperantisto: Pere Bernús, Llibert Puig, Marina Ollé, Pako Belmonte

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

REKOMENDINDAJ SOMERAJ ARANĜOJ

Se vi partoprenas la 86-an Universalan Kongreson de Esperanto okazonta en Zagrebo inter la 21-a ĝis la 28-a de julio 2001 vi povas tuj sekve partopreni alian interesan internacian aranĝon tre proksiman, aŭ la:

Renkontiĝo de geamikoj pri internacia solidareco okazonta en Sarajevo inter la 29-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2001, aŭ la:

70-a Itala Kongreso de Esperanto okazonta en Triesto (Italio) inter la 28-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2001.

(Nia asocio pretas sendi al vi aliĝilon de ambaŭ aranĝoj laŭ via peto)

AVIADILA KOLEKTIVA VOJAĜO


Se minimuma grupo da 10 homoj pretas kunvojaĝi ni povos proponi tre interesan kolektivan prezon por du celoj: kaj nur por la 86-a UK kaj por la UK+Sarajevo. Nepre informiĝu ĉe nia asocio, telefone, fakse aŭ rete.

PRI NOVA REVUO

Novan revuon nia asocio peras por 2001. Temas pri KOMENCANTO, 12-paĝa gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj eldonita en Rusio. Ok numeroj jare. Jarkotizo: 2.200 p-toj

kovrilpaĝo

- La unua foto montras niajn tri katalunajn junulojn partoprenintaj la 56-an IJK en Hongkongo (legu raporton pri ĝi sur paĝo 4-a de nia septembra numero)
- La dua foto montras la partoprenantojn en la pridebata renkontiĝo (legu raporton en ĉi tiu sama numero)



DEBATO PRI ASOCIA REORGANIZO

Ĝi okazis ne dum la anoncita semajnfino 21-22 de oktobro 2000, sed dum la posta 28-29 pro organizaj kialoj de la restadejo. Partoprenis 18 homoj kaj la restado disvolviĝis bonetose, pri kio ankaŭ influis la belega vetero kaj la servoj de la restadejo. Jen raporto de Abel Montagut-kiu tre aktive kunlaboris en la debato-pri la tri okazintaj kunsidoj:

Unua kunsido (sabate antaŭ la vespermanĝo)

Ĝenerala temo: KEA>KEF kaj statutaj punktoj.
-Neus Moly informis ke la "Generalitat" ne akceptis la nom-ŝanĝon aprobitan en Manresa, ĉar la statuto de KEA, kiun oni prezentis kun la modifo KEA>KEF, ne respondas al Federacio laŭ la koncerna leĝo de asocioj. Por Federacio necesas ke la membroj estu asocioj, rekonitaj grupoj (almenaŭ 3) sed la membroj ne povas esti apartaj individuoj.

-La partoprenantoj akceptis ke oni proponu la kreon de KEF surbaze de la grupoj/asocioj: KEA, KEJ, Centro de Esperanto Sabadell, Espero, k.a. se ili volas aliĝi al ĉi tiu Kataluna E-Federacio. Unuavice necesas tri el tiaj grupoj/asocioj. Ili devas asemblee akcepti la aliĝon al la fondota Federacio. Tion prefere oni faru antaŭ la fino de la jaro 2000, por ke oni povu denove prezenti al la "Generalitat" la adekvatan statuton por aprobo de KEF. Ĉi tiu statuto estus esence kiel tiu de KEA, sed kun la redukto de la membroj al nur grupoj aŭ asocioj konsentantaj pri la celoj ktp.

Dua kunsido (sabate post la vespermanĝo)

Ĝenerala temo: Filozofiaj aspektoj rilatantaj al Esperanto kaj al la esperanta komunumo, ĉi ties celoj, futuro, ktp.

-La du ekstremaj perspektivoj estus:

A.-La radikala Raŭmismo (Paktismo) de la Pakto por la Esperanta Civito, laŭ kiu oni starigu specifan esperantlingvan komunumon kun multaj similaĵoj al la nun ekzistantaj minoritatoj: minoritata diasporo, sed kun propra organizo eĉ leĝa kaj tribunala.

B.-La finvenkismo absoluta, laŭ kiu ĉiu homo parolu Esperanton kiel ĉiun lingvon kaj se necese pere de ĝenerala deviga instruado.

-Laŭ mia persona impresado oni alvenis al meza vojo, surbaze de la argumentoj de la unujara debatado en interreto de post la kongreso en Manresa. Mi provos konkretigi tiun mezan vojon:

-Oni prenu kiel teorion, seriozan gvidilon la Universalan Deklaracion de Lingvaj Rajtoj (Barcelono 1996), precipe ĝiajn unuajn partojn: Preliminars, Preambul, Titolo Preliminar (=Precisions conceptuels), Titolo Primer (=Principis generals).

-Laŭ tio oni strebus al la respekto de la lingva diverseco kaj al la egaleco en la lingvaj rilatoj, individue kaj kolektive, interdepende.

-Esperanto povas kontribui al tiu egaleco kaj al la respekto de la lingva diverseco. Sed pli gravas la informado, la dokumentado kaj la konsciigo pri tiuj temoj, ol la instruado, respektive lernado, de la lingvo Esperanto.

-Oni ne strebu al ia fina venko en kiu ĉiu parolas Esperanton, sed al situacio en kiu laŭeble multaj homoj konscias pri la graveco de tiuj aferoj: a) la valoron de la lingva diverseco kaj aparte la valoron de ĉiu lingvo kiel tradicia esprimilo de difinita kolektivo, kultura kreo enradikiĝinta en la koncerna medio, b) la valoron de egaleca lingva komunikado, c) la nunan situacion en kiu multfoje ne regas egaleco.

-Ĉi tiu konsciigo eble same malfacile atingeblas kiel la konsciigo pri la valoroj de demokratio, de senarmigado, de ekologio, de alternativaj energioj... Sed necesas klopodi en tiu direkto. Oni ne enfermu sin en aparta grup(et)o kiu ne interesiĝas pri la ĝenerala socio kaj ĉi ties problemoj. Aliflanke oni ne senreviĝu se ĉiuj homoj ĝenerale ne vidas la valorojn de lingvaj diverseco kaj egaleco kaj la potencialan kontribuon de Esperanto. Des malpli se malmultaj homoj efektive lernas kaj uzas la internacian lingvon.

-Du el la ĉeestantoj proponis enkonduki ĉi-koncernan aldonon en la 4-a punkto de la statuto de KEA (kaj de estonta KEF) pri la unua celo de la asocio. La nuna teksto diras:
I. Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto sur la agadteritorio, aplikante ĉiujn

NIA AGADO

rimedojn de informado laŭ la Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo.

Laŭ la propono ĝi tekstus:

I.-Disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto sur la agadteritorio, **en akordo kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948) kaj en akordo kun la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj (1996)**, aplikante ĉiujn rimedojn de informado laŭ la Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo.

La samtabloj akceptis ke oni prezentu ĉi tiun proponon en venonta Asembleo.

Tria kunsido (dimanĉe matene)

Ĝenerala temo: konkretaj aplikoj

-Kongresoj: ĉar ne eblas okazigi katalunan kongreson ĉiujare, oni okazigu renkontiĝon en la jaroj kiam ne estas kongreso. Ĉi tiu renkontiĝo (ekz. kiel la nuna) inkludu laŭeble distran programon, ekz. muzikon kaj ankaŭ prelego(j) aŭ aranĝojn por komencantoj.

-En niaj kongresoj okazantaj ĉiun duan jaron: oni organizu laŭeble, prefere ĉiam, antaŭkongreson por eksteruloj en oportunaj tagoj, t.e. ĵaŭde kaj vendrede antaŭ la propra esperantlingva kongreso. La celo estu informi kaj interesigi la ĝeneralan publikon pere de debatoj kaj/aŭ prelegoj ktp. Notindas ke oni povus inviti gravulojn kiel tiuj kiuj ĉeestis la Unesko-kluban debaton pri la lingvoj en Eŭropo, ekz. Jordi Solé-Camardons, L. de Yzaguirre, Miguel Siguan... kaj eble ankaŭ verŝajne, Jesús Tusón, Miquel Strubell, Isidor Marí k.a. kiuj respondis kun intereso al la propono de la sekretario de KEA en tiu okazo. (Mi mem pensas ankaŭ pri Miquel Pueyo kaj pri Josep Murgades, se la afero okazus en universitato).

La oportuna ejo por tiu antaŭkongreso estus: universitato, ateneo, altlernejo, k.s. (lu riskis proponi ke oni povus okazigi eĉ televidan debaton kun tiuj gravuloj... Sed tio estas "pisi tro alten")

-Flugfolioj kaj informiloj: oni pretigu plurspecajn akorde kun la celata grupo: por alternativaj grupoj (ekologiemuloj, ktp); por anarkiuloj kaj similaj; por universitatoj; por emeritoj, ktp. La propono de Ferriol ŝajnis unu

el la taŭgaj kaj imitindaj modeloj. La teksto de A.Valén pri Esperanto ŝajnis oportuna por universitatoj kaj simile. Ĉiel ajn oni ĉiam kontroligu la flugfoliojn kaj informilojn koncerne la ĝustan nacilingvan lingvaĵon fare de laŭeble du malsamaj homoj. Same oni kontroligu ilin fare de profesiuloj pri reklamado. Laŭeble almenaŭ unu el ili estu ne-esperantlingvano. Nia informado estu profesinivela, rigora kaj akorda kun la cirkonstancoj laŭ la samaj parametroj ĝenerale validaj.

-Aldone mi mem sugestis ke eblus proponi la restarigon de la Internaciaj Floraj Ludoj por la katalunaj kongresoj kun jena profilo:

1.-Unu sola premio por poezio (por konservi la tradicion de la IFL-oj kiuj estis/estas prestiĝaj interne de la E-komunumo)

2.-Premio por eseo kiu prezentus la temojn menciitajn en la sabata filozofia kunsido (Lingva Rajtoj, lingva egaleco, ebla kontribuo de Esperanto ĉi-koncerne, ktp) pensante pri ĝenerala publiko, kun la celo publikigi ilin poste en ĵurnalo, en gazeto aŭ simile, en nacilingva traduko. Tio estas, la eseo estus originale en Esperanto, sed ĝi ne celus la jam konvinkitajn E-parolantojn, sed la ĝeneralan publikon. La premio estus ĝia publikigo, krom ankaŭ, se eble, mona rekompenco, aŭ invito por venonta kongreso kun senpaga restado, aŭ aĉetado de varoj en la servoj de KEA, ktp. (Mi aldonas nun ke la nomo de ĉi tiu aparta premio povus esti: Eseo-Premio Delfí Dalmau (Premi d'Assaig "Delfí Dalmau") kaj ke eble oni povus akcepti tekstojn en la kataluna kaj en la kastilia).

Fine, mi rememorigas ke ĉi tio estas mia persona resumo. Ĝise, Abel
(vidu frontpaĝan foton pri la renkontiĝo)

BIBLIOTEKA APOGO ROMA KAJ POUL THORSEN

Ĉi-jare nia asocio prezentis sian peton al la menciita Fondaĵo kaj kun ĝojo ni estis subvenciitaj per 250 eŭroj, unu el la ĉefaj apogoj. La subvencio konsistas el libroj laŭ la asignita valoro kaj ni elektis 12 librojn el la eldonejo Ludovikito pri la E-historio. La ricevitaj libroj brile riĉigas nian kolekton pri movadaĵoj. Ni sendis dankespriman leteron al

ges-roj Thorsen kiuj tiel malavare provizas la bibliotekajn asociojn.

BARCELONO

En la sidejo de Unesko-klubo ekde novembro 2000 okazas la 3-a universitata kurso de Esperanto, gvidata de geprofesoroj Neus Moly kaj Ramon Perera. La sukcesintaj lernantoj ricevas 3 kreditojn de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono (UAB) post la 30-hora teoria kaj praktika kurso. La 4-a kurso komenciĝos en februaro 2001.

(Interesiĝantoj sin turnu al la kursdirektorino sino Neus Moly tel.93-458.5699 kaj retadreso: ramoneus@drac.com)

MAJORKO

La semajnfino de la 18-a –19-a de novembro okazis en Sta.Maria del Camí supera kurso de Esperanto.Partoprenis sep gelernantoj kaj ĝin gvidis Hektor Alòs el St.Cugat.

La kurso estis tri-sesia kaj daŭris entute dek horojn. La lernantoj ricevis kvizon (tridekon da frazoj, kiuj ofte sed ne ĉiam entenis erarojn), per kiuj oni pridiskutis oftajn gramatikajn kaj leksikajn erarojn.

Oni ankaŭ komparis kelkajn alineojn de du tradukoj de La Metamorfozo de Kafka (tiuj de Lutermann kaj de Nervi) kaj ankaŭ iom analizis la unuan ĉapitron de la Auld-a traduko de "La junularo de l' ringo".

La lernantoj ricevis kopion de 30-paĝa prikomentita bibliografio de gravaj esperantaj libroj el la inform-libro de Antonio Valén baldaŭ aperonta kaj hispane kaj katalune.Dum la prezento de tiu grava studo, la lernantoj povis foliumi multajn el la verkoj.

Fine oni esploris la plej gravajn esperantajn TTT-ejojn kaj la lernantoj ricevis ankaŭ lumdiskon kun retadresoj, utilaĵoj, radioelsendoj kaj libroj elŝutitaj el la reto.

Ekster la kurso mem, regis tre gaja etoso dum la komunaj manĝoj kaj la fina ekskurso al proksima belvidejo. sk

SABADELL

En la loka grupo Centro de Esperanto Sabadell (CES) okazas elementa kurso de post novembro 2000 kun 8 gelernantoj, gvide de ties prezidanto Llibert Puig. Ĉi-jare okazas nek meza nek porinfana kursoj, sed baldaŭ komenciĝos konversacia rondo unufoje semajne (anoncotaj tago kaj horoj).

SANT PAU D'ORDAL

Pasintan aŭguston okazis la ora geedziĝa datreveno de niaj karaj kaj fidelaj membroj Lluís M.Hernández Yzal kaj lia edzino Teresa Massana, al kiuj nia asocio sendas plej varman kaj elkoran gratulon.

TARRAGONA

Nia loka aktivulo Joan Marimon ankaŭ ĉi-jare gvidas E-kurson en la sama hospitalo Joan XXIII.

ORDINARA KAJ EKSTERORDINARA ASEMBLEOJ

Nia asocio okazigos ambaŭ Asembleojn sinsekve, sabaton la 3-an de marto 2001 laŭ ĉi-aldona kunvokilo. Nepre rezervu la anoncitan posttagmezon en via agendo. Necesas plej granda partopreno pro la graveco de la tagordoj.

KALENDARO 2001

La Plenumkomitato de nia asocio deziras al vi grandan feliĉon okaze de la nova jaro, de la nova jarcento kaj de la nova jarmilo kaj por ke vi memoru nian asocion kaj ties aranĝojn ni kunsendas esperantlingvan poŝkalendaron, kiel unuan paŝon en la renovigo de niaj ĝisnunaj jam kadukaj informiloj.

NEKROLOGA BIOGRAFIO DE SOLEN'

Solen', E-aktorino kaj reĝisorino forpasis la 12-an de oktobro 2000. Ŝi naskiĝis en la jaro 1955. Ŝiaj gepatroj Gino kaj Jeanine Gaspard estis blindaj esperantistoj. Jam la familio devis funebri iliajn ambaŭajn forpasojn antaŭ du jaroj (junie kaj novembre).

Kiam infano Solen' vizitadis diversajn E-aranĝojn: kulturajn dimanĉajn programojn en Parizo, kie ŝi vivadis; UK en Vieno, Madrido kaj Hamburgo.

De ŝiaj dekkvin jaroj ŝi pasie dediĉadis sin al teatro. Ŝi mem reĝisoradis kaj ĉefrolis en prezento de "l'Aiglon", impona ĉefverko de Edmond Rostand ses-akta kun kunlernejaninoj, kiam ŝi estis deksesjara.

Ekde 1976 Solen' havis centran pozicion en la vivo de TESPAs (Teatro Esperanto de Parizo) kun kiu ŝi, ludante ĉefrolojn, zorgante pri dekoroj, kostumoj, son-kaj lum-teknikoj kaj reĝisorante surscenigis: Andromaka de Jean Racine (1976), La Justuloj de Albert Camus (1977), La Kalva Kantistino de Eugène Ionesco (1978), la Fatomaŝino de Jean Cocteau (1979).

luj eble memoras, ke ŝi rolis la Sfinkson graveda, ĉar en ĉi jaro ŝi naskis sian unuan filinon, kies patro estas Arno Lagrange, denaska esperantisto, filo de Georges Lagrange. Ŝi partoprenis en diversaj malpli gravaj verkoj aŭ verjeroj (Korvo de Kisaku Tabata, Aŭtunaj ventoj de Pujulà i Vallès, Edipo Reĝo de Sofokles (ero), La Forpasinto de René de Obaldia,...) Ŝi ankaŭ aktive partoprenis en "la Ruza Kruĉo", pariza E-kabaredo en la jaroj 78-80 kaj redaktadis E-teatro-gazeton "Kulisoj Internaciaj".

En 1980 ŝi forlasis Parizon kaj TESPAs-on kaj plu aktivadis en teatro en kadre de "Teatro Krizalido", kiun ŝi fondis kun Arno L. Krizalido surscenigadis teatraĵon dulingve (france kaj Esperante) en 1981: "Ĉu Dio bojas? De François Boyer, en 1982: "La Evento" de Guy Foissy. En 1983-84 ŝi partoprenis en "Babel aujourd'hui", franclingva varbspektaklo pri E-o, kaj diversajn aliajn teatraĵojn ("Soleco/Solitude" de Emilija Lapenna laŭ E-originalo, "La forlasitino/La délaissée" de Max Maurey,...)

En 1983 ŝi naskis sian duan filinon Morgane. Tamen senhalte Solen' plu teatrumis; en 1984 ŝi verkis kaj surscenigis "Princesses Englouties", kiu estis prezentita en Festivalo de Avignon dum unu monato. En 1986 estis pretigitaj "La Amanto/L'Amant" de Harold Pinter kaj "La Plezuro disiĝi/Le plaisir de rompre" de Jules Renard. luj el tiuj spektakloj estis montritaj en turneo en Londono kaj en Pollando en la jubilea jaro 1987. En 1989 Solen' ekprezentadis "Meluzina/Mélusine", kiun ŝi mem verkis kaj montris interalie en KEF en Västerås 1990) kaj en UK en Montpellier (1998). En 1994 kaj 1995 ŝi reĝisoris ambician historian spektaklon kun kvardeko da partoprenantoj "Les Mystères de Figeac", kiun ŝi refoje mem verkis, kun centoj da spektantoj en subĉiela teatro dum pluraj someraj vesperoj en Figeac.

Ŝiaj lastaj E-prezentaĵoj estas "Meluzina" en Montpellier kaj "Lau neĝon fali" laŭ Pierre Dupoyer, kiun ŝi solfoje prezentis en KAFE en Tuluzo en julio 2000. Tiu lasta spektaklo faris grandan impreson al la publiko kiu vidadis ŝin iradi per rulseĝo kaj tamen ŝi kuraĝege rolis tiun ege emociigan spektaklon (pri virino freneziga), kvankam ŝi apenaŭ povis stari. De kelkaj jaroj ŝi pretigadis novan spektaklon pri Champollion, la malkovrinto de la egiptaj hieroglifoj naskinta en Figeac. La titolo de la plenita spektaklo estas "la Egiptano". Sed jam sanaj zorgoj ade prokrastis la finrealigadon de la projekto.

Finfine ŝi estis definitive devigata rezigni pri la projekto.

(Laŭ Eurokka retmesaĝo)

AL LINGVA DEMOKRATIO

(Strategia Laborplano de UEA 2001-2010)
Ni kunsendas apartan folion kun la kompleta teksto de la Strategia Laborplano de UEA, kiun ni rekomendas ke vi legu atente kaj reagu se vi deziras ion proponi aŭ modifi. Ju pli da proponoj des pli bonan Laborplanon oni povos prezenti dum la UK en Zagrebo por ĝia definitiva aprobo.

INTERNACIA SIMPOZIO PRI LINGVA PLANADO KAJ LEKSIKOLOGIO

Sub la aŭspicioj kaj kun la subteno de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, la Akademio de Esperanto organizos internacian simpozion pri lingva planado kaj leksikologio okazonta en Zagrebo (Kroatio) de la 28-a ĝis la 30-a de julio 2001 en la Iliria Halo de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj-Opatička, 18 HR-10000 Zagrebo. La laborlingvoj estos la kroata, esperanto, la angla kaj la franca.

La malferma ceremonio de la simpozio okazos en la posttagmezo de la 28-a de julio (sabate) kaj la simpozio finiĝos en la posttagmezo de la 30-a de julio 2001 (lunde). Personoj kiuj deziras partopreni en la simpozio (eĉ sen prezento de iu verko) estas petataj informi profesoron Christer Kiselman: kiselman@math.uu.se, antaŭ fino de majo 2001 (papera adreso: poŝtkesto480 -SE-751 06 UPPSALA (Svedio).

DISSENDLISTO PRI HOMAJ LINGVAJ RAJTOJ

“Homaj Lingvaj Rajtoj” estas unue dissendlisto en Esperanto pri la diversaj nunaj situacioj de atencoj kaj malrespektoj al la homaj lingvaj rajtoj en la mondo. Nuntempe en multaj lokoj de la mondo, multaj homoj, etnaj grupoj kaj nacioj suferas pro lingva diskriminacio kaj lingva antaŭjuĝo fare de ŝtatoj, institucioj kaj homoj.

La celo de la dissendolisto “Homaj Lingvaj Rajtoj” estas ne nur diskuti pri tiuj problemoj (ofte neglektataj de la amaskomunikiloj), sed ankaŭ proponi urĝajn agojn: sendadon de

protest-leterojn, faksojn, elektronikajn retajn mesaĝojn, subskribojn de peticioj al registaroj de ŝtatoj aŭ estroj de institucioj kiuj ne respektas la homajn lingvaj rajtojn.

En la mondo ankoraŭ ne estas internacia organizo kiu batalas specife por la defendo de homaj lingvaj rajtoj. La starpunkto estas ke nur organizo kiu uzas sennaciecan lingvon (esperanto) kaj kies lingva politiko ne privilegias unu aŭ kelkajn naciajn lingvojn havos autentikecon por defendi lingvaj rajtojn. Pro tio, la lingvo uzota de ni estas esperanto. Membroj de la reto (dissendlisto) rajtos skribi protest-leterojn al registaroj/institucioj en iu ajn lingvo.

La “Urĝa Ago” konsistos el skribado de protest-leteroj per respekto-plena maniero al aŭtoritatuloj por peti respekton al lingvaj rajtoj de la subpremataj homoj kaj por peti ke ĉesu tuj la diskriminacioj.

La bazo por niaj argumentoj estas la Deklaracio de la Homaj Rajtoj (neniu homo povas esti diskriminaciata pro lingvaj motivoj) kaj la Kongresa Rezolucio de la 65-a Universala Kongreso de Esperanto (Stokholmo 1980)

En la esploro pri la atencoj al lingvaj rajtoj estos uzataj la jenaj fontoj: interreto, gazetoj, libroj, geografi-historiaj jarlibroj (almanakoj), raportoj de esperantistoj, informoj petitaj de ambasadorejoj, universitatoj kaj institucioj.

Por aboni oni sendu malplenan mesaĝon al: rajtoj-subscribe@egroups.com

Por malaboni, oni sendu malplenan mesaĝon al: rajtoj-unsubscribe@egroups.com

Bonvolu atenti ke kiam vi sendos blankan mesaĝon por abonigo, tuj venos al vi mesaĝo, kiu petos in konfirmi vian aliĝon (por kazo se iu alia krom vi petis aliĝon anstataŭ vi). Tiam vi simple per REPLY (Respondo) resendu saman mesaĝon blanke kaj tiel vi eniros la liston.

Pliaj informoj:

<http://orbita.starmedia.com/~rajtoj/index.html>

INFORMADO

GVIDLINIOJ POR INFORMADO PRI ESPERANTO

Post pli ol unujara preparado ricevis sian finan formon "Gvidlinioj por informado pri Esperanto". Laborgrupo de la Komitato de UEA diskutis pri ĝi unuafoje en la Berlina UK. En Tel-Avivo la Komitato aprobis la novan dokumenton, rajtigante la estraron pri informado, Kalle Kniivilä, zorgi pri ĝia redakta finpoluro. La oficiala publikigo okazis en la oktobra numero de la revuo Esperanto kaj la jubilea 100-a numero de la retaj Gazetaraj Komunikoj de UEA.

Prezente la Gvidlinioj Kniivilä skribis pri iliaj fono kaj celoj, jene memorigante pri la Principaro de Frostavallen el 1956: "La ĉefa konkludo de tiu baza dokumento pri informado ne perdis sian aktualecon. Por sukcesa informado necesas profundaj konoj kaj klara konscio pri la valoro de la fenomeno Esperanto. Nur per sufiĉaj scioj oni povas kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Tial la unua tasko de informanto estas informi sin mem, kaj tiu lernado neniam ĉesas"

CELOJ

Konsciigi la Publikon pri la Problemoj en la Nuna Internacia Lingva Ordo

Ĉia informado pri Esperanto estas senperspektiva, se la celgrupo ne konscias pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj la nedemokratieco de la nuna internacia lingva ordo. La unua celo de la informado devas sekve esti ke la ĝenerala publiko malkovru la fundamentan nedemokratiecon de komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn sed postulas de aliaj jarojn da penoj por atingi tamen malperfektan lingvo-scion. En la strebado estigi diskuton pri lingva egaleco kaj lingvaj rajtoj troveblas multaj potencialaj aliancanoj kun similaj celoj. Ekzistas multaj sciencaj verkoj pri la efikoj de lingva neegaleco je tutmonda, loka kaj individua niveloj. Indas, ke respondeculoj pri informado bone trastudu la temon. Por ŝanĝi la realaĵojn necesas unue ĝisfunde ekkoni ilin.

Konsciigi la Publikon pri la Ekzisto kaj Funkciado de Esperanto

Esperanto estas unika fenomeno, kaj antaŭ ĉio necesas ke la esperantistoj mem plene konsciu pri tio. Ĉiu esperantisto povas rakonti pri personaj spertoj kiuj ofte estas tute neimageblaj al eksteruloj. Konkretaj spertoj kaj veraj homoj el foraj landoj estas la plek konvinka rimedo por atentigi la publikon pri la ekzisto de tiu fenomeno. Gravas ja ke la informado ne estu tro akstrakta: imponi povas personaj riĉiĝoj pere de Esperanto, emociaj kaj intelektaj. Informado pri Esperanto devas unuavice esti ĝuste informado, ne propagando. En informado ĉefan rolon havu veraj informoj, ne sloganoj ("Lingvo de paco kaj amikeco", "ĉies dua lingvo" ktp). Ne ĉiu volas lerni Esperanton, sed multo estas atingita, se oni sukcesas konsciigi pli vastan publikon pri tio ke Esperanto estas vera vivanta lingvo kun parolkomunumo kiu ampleksas la tutan mondon, lingvo-komunumo en kiu ĉiu ano povas senti sin plenrajta membro. Jam tio estas revelacio por la plej multaj homoj. Por efike informi pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto necesas ke la esperantistoj mem pli profunde konu la fenomenon Esperanto, kaj sekve pli kuraĝe argumentu kontraŭ eraraj prezentoj.

Proponi Esperanton kiel Solvon en Konkretaj Situacioj

Nur post kiam la unuaj du celoj estas almenaŭ parte atingitaj, eblas serioze proponi uzon de Esperanto kiel solvon en iuj konkretaj situacioj. Necesas ĉiam konscii ke Esperanto ne estas magia bastoneto, kiu per unu frapo povus forigi ĉiujn problemojn de lingva neegaleco. Antaŭ ol proponi Esperanton en konkreta situacio, necesas ĝisfunde pripensi, kiun precizan rolon Esperanto povus havi, kiaj estus la avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kaj kiaj estos la argumentoj de la kontraŭuloj. Sed en kazoj kie la avantaĝoj estas klaraj kaj la kontraŭargumentoj facile refuteblaj, oni kuraĝe faru sian proponon, aŭ se eble, simple ekuzu Esperanton.

Kuraĝigi al Lernado de Esperanto

Lerni Esperanton volos unuavice homoj kiuj konscias pri la problemoj en la nuntempa internacia lingva ordo aŭ sentas sin altirataj de la tutmonda egaleca lingvokomunumo de la Esperanto-parolantoj. Sekve la plej bona maniero verbi kursanojn estas konsciigi la publikon pri la ekzisto de tutmonda, egalecefunkcianta lingvokomunumo, en kiu ĉiuj bonvenas. Malmultaj deziros lerni Esperanton nur pro tio ke ĝi estas relative facila lingvo. Ne la gramatikaj detaloj sed la fakto ke ĉiu povas igi Esperanton sia propra lingvo, igas ĝin unika kaj lerninda.

(Sekvos sur venonta revuo)